



BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

ISSN 0006-9477



104-a jaro
N-ro 337
Junio 2011

SAN-PAŬLO

KONGRESURBO




OMAGNO AL LA 8-A TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO



Kovrilo

Sur la kovrilo aperas foto de la urbo San-Paŭlo, kie okazos samtempe tri gravaj eventoj, de la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011, nome 46-a Brazila Kongreso de Esperanto, 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto kaj 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso. Triobla festo! Dum tiu periodo, la urbego San-Paŭlo fariĝos la ĉefurbo de la Esperantujo en Ameriko.



Avenuo Marginal Pinheiro
Nokte

Enhavo

- 04** Ĉefartikolo
- 05** Poemo: Jorge das Neves
- 06** Opinio: Benedicto Silva
- 08** Omaĝo: Irani Baggi de Araújo
- 09** Eventoj: BEL-Estraro
- 10** Omaĝo: Fernando Marinho
- 12** Movado: Brazila Kroniko
- 14** Literaturo: Lima Barreto / Tradukis: Francisco S. Wechsler
- 16** Opinio: Paulo Sérgio Viana
- 18** Forpaso: Manoel / Ronilson / Judith

Eldiro

"(...) hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo- sur- Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj."

Lazaro Ludoviko Zamenhof
Unua Kongreso, 1905.

Revunkunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciiĝi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

	tutpaĝa (19x25cm) 4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora) 2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00 (nigra-blankaj)		1/2 duonpaĝa (9x24cm) R\$ 450,00 (kolora) R\$ 300,00 (nigra-blanka)		1/3 trionpaĝa horizontale (8x18cm) R\$ 300,00 (kolora) R\$ 200,00 (nigra-blanka)		1/3 trionpaĝa vertikale (8x18cm) R\$ 300,00 (kolora) R\$ 200,00 (nigra-blanka)		1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm) R\$ 150,00 (kolora) R\$ 100,00 (nigra-blanka)
--	--	---	--	---	---	---	---	---	--

Brazila Esperantisto aperas denove

Brazila Esperantisto bonvenigas vin kiel sian leganton!

Brazila Esperantisto, la oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo, aperas ekde 1907, sed trapasis periodojn de pli ofta kaj regula eldonado kaj aliajn periodojn kiam ĝi tute malaperis. La nuna estraro de BEL intencas publikigi ĝin kvarfoje jare. Tio estas malfacila tasko, ĉefe pro la financa problemo. Malgraŭ la malfacilaĵoj, ni esperas atingi la celon.

Ni elkore tre dankas al niaj fidelaj legantoj kaj al niaj kunlaborantoj pro ilia sciopleno helpo. En ĉi tiu numero kunlaboris Paulo Sérgio Viana, Benedicto Silva, kaj Jorge das Neves. Ni certas, ke ili daŭrigos la kunlaboradon, sed nia revuo bezonas pli da kunlaborantoj. Bonvolu, sendi al BEL viajn artikolojn kaj informojn pri la movado en via regiono. Viaj skribaĵoj aperos en la revuo. Ankaŭ ni akceptas sugestojn por plibonigi nian taskon.

La estraro de BEL volas, ke la revuo estu vere la heroldo de nia movado, montrante

entuziasme la agojn de brazilaj samideanoj.

Brazila Esperanto-Ligo profitas la okazon por saluti la esperantistaron, kiu partoprenos en la 46-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (31^a BEJK) kaj en la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (8^a TAKE), gravaj eventoj okazontaj en la urbego San-Paŭlo, de la 9-a ĝis la 14-a de julio.

La oficiala temo estas "Procezoj de regiona integriĝo en la Amerika Kontinento : la rolo de Esperanto".

Kompreneble, ni ĉiuj respondecas pri la efektiva rolo de nia lingvo, kiu progresas malrapide, sed kun forta kaj vigla espero, antaŭvidante plej bonajn tagojn.

BEL-estraro deziras al ĉiuj samideanoj plensukceson okaze de la tri kongresoj.

BEL-estraro 2010-2013.



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalisto: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Eurípedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisio

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasília/DF)

Kontribuajojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907



Sidejo SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF

Telefono (0xx61) 3226 1298 Fakso (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Eurípedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-ino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro
3-a Sekretario S-ro Devanizio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrolo Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno,
Cleto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ro José Roberto Tenório da Silva

Komitatano-A Paulo Nascenles

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Pilon

Amikeco

Jorge das Neves

La samideano Jorge das Neves ricevis la unuan premion en la Poezia Konkurso 1983 organizita de Triesta Esperanto-Asocio (Italio). Jen la poemo elektita en tiu konkurso:

Jen fabela pejzaĝo kun vetero
kutime suna, blua la ĉielo
stelplenaj noktoj...Pepas ja pasero
en la lando de floro kaj mielo!

Sed l'amikeco estas la mistero
de la ĉarmo sur tiu grundo,
celo de la dioj ŝvebantaj en l' aero
renkonte al feliĉo kaj al belo...

Amikeco senpaga, neprograma
naiva, komplezema, tute pura
de popolo sincere tre gastama.

Amikeco nenie pli trankvila
ĉar ĝi estas normale plej natura
en ĉiu koro vasta kaj ĝentila!

B
F
A
Z
I
AE
S
P
E
R
A
N
T
I
S
T
O

5

N
r
o3
3
7J
u
n2
0
1
1

Jen la horo kaj la vico de Esperanto

Benedicto Silva

*La nuna stato de la
Interreto ĉe la junularo en la
tuta mondo inspiris al mi la sekvajn
pensojn, rilate al Esperanto.*

Estas nekomprenebla kaj eĉ okulfrapa la antaŭjuĝo ĉie kaj ofte manifestata ĉefe de pluraj lingvoinstruistoj kaj kleruloj kontraŭ Esperanto, en la tuta mondo. Kaj multaj, multegaj naivuloj pligrandigas la vicon de malamiko de nia internacilingvo.

El iliaj argumentoj tamen estas facile konstati, ke preskaŭ ĉiam tiuj antipatiantoj kontraŭ Esperanto faras siajn atakojn tute sen antaŭe ekzameni, ĉu detale, ĉu flugrigarde, almenaŭ la gramatikan strukturon de nia lingvo...

Esperanto havas tre internacian vortaron, kio per si mem ebligas al ĉiu lernanto tuj kompreni kaj parkeri grandan kvanton de ĝia leksiko, tiamaniere ke post nur unu-du semajnoj da lernado, li povas ne nur korespondi kun alilandaj esperantistoj, sed ankaŭ komenci legi eĉ klasikajn verkojn de la internacia literaturo!

Jes, ekde sia kreado, en la fino de la 19-a jarcento, Esperanto havas bibliotekon vere imponan, ne nur pro la nombro de tradukitaj verkoj, sed precipe pro la graveco de la unuaj beletraĵoj esperantigitaj de Zamenhof mem.

Miaopinie, mi forte akcentu ĉi tie, ke la plej granda indeco de Zamenhof venas ne nur de la kreado de la lingvo internacia, sed precipe de la fiksado de la modela stilo, kiun li enblovis en Esperanton kiel ties spiriton, kaj kiu restis en lia tuta vasta tradukita verkaro, precipe en la Malnova Testamento.

Kiel stilisto, Zamenhof havis eminentajn sekvantojn en ĉiuj mondpartoj: Kabe, Grabowski, Enghol, Kalocsay, Auld, Porto Carreiro Neto, Ismael G. Braga, Knoedt, Paulo S. Viana, Fernando Diego, Gerrit, Nakamura, Gaku, Bakin, Laŭlum, Leppäkoski kaj multajn, tre multajn aliajn...

Por ekzemplo, el Italio, lulilo de nia okcidenta civilizacio, lastatempe plezurigas nin per

altnivelaj tradukoj de klasikaj verkoj la eminenta Enrico Dondi. Verkoj de Dante (La Dia Komedio, Vivo Nova kaj La Floro) kaj de Torquato Fasso (Jerusalemo Liberigita) jam povas esti tutmonde legataj en flua, belsona lingvaĵo, dank'al lia tradukarta majstreco.

La samon mi povas diri pri Nederlando, de kie jam de kelkaj jaroj venas al ni ne nur altpensaj eseoj pri bibliaj temoj, sed ankaŭ juvelaj paĝoj de Couperus (Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj kaj Fatalo), se ne paroli pri la ĉarmaj klasikaj tekstoj de la Antologio Latina (jam en tri volumoj!) ... ĉio malavare donita al ni de la klera, talenta Gerrit Berveling...

Resume, mi ree asertu, ke, kiel eterne imitinda majstro, Zamenhof disĵetis ja sur la fekundan grundon de literaturo la semojn de sukriĉaj arboj, senĉese florantaj tra la mondo por plezurigi la homan spiriton per freŝaj ombroj kaj orbrilaj fruktoj, ĉiam en la formo de belaj sentoj kaj transcendaj emocioj...

Surbaze de la ĉi-supre menciitaj kvalitoj de Esperanto, la gramatika kaj la beletra, t.e., la materia kaj la spirita, nia lingvo nepre triumfos kiel larĝa kaj facila vojo, kondukanta al la riĉega trezoro de la tutmonda kulturo.

Kvazaŭ impertinente trouzante la paciencon de miaj legantoj kaj reliefigante la gravecon de la tutmonda literaturo en la verda Esperanto-vesto, ĉi tie mi registru plu la Serion Oriento-Okcidento inaŭguritan sub la Aŭspicioj de U.E.A en Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.K.O., en 1961, kun la celo disvastigi en la internacia lingvo elektitajn verkojn reflektantajn la tre altan kvaliton de la tradukoj... (Ni konsentu do, ke Esperanto naskiĝis sub la signo de la tradukarto!) Tiu Serio jam havas 45 verkojn, kies lasta titolo estas La Edzino de Kuracisto Hanaoka Seishyu de Ariyoshi Sawako, en traduko de Konisi Gaku. Mi ne povas ne informi ĉi tie, ke en tiu Serio jam aperis pluraj verkoj, inkluzive de Nobel-premiitoj (ekzemple, Tagore, Kawabata, Grass...).

Post la ĉi-supraj konsideroj (aŭ oldulaj grumblaĵoj...), nenecese ree diri ĉi tie, ke Esperanto fakte triumfos, kiam la nuntempaj komunikemaj junuloj, jam disponante la miraklan potencon de la interreto, per si mem malkovros nian facilan komunikilon, kies posedo postulos de ili minimuman penadon, ĉar al ili estas facile vidi, ke Esperanto estas rapide lernebla dank'al siaj malmultaj gramatikaj reguloj, ĉiuj tre simplaj kaj sen la teruraj esceptoj, kiuj ordinare turmentas la lernantojn de ĉiuj naciaj lingvoj.

Kiam la malamikoj de Esperanto malkovros ĉi tion? Baldaŭ, tre baldaŭ, ĉar la antaŭjuĝoj ne estas eternaj, kaj la hodiaŭa tendenco estas la simpligo de ĉia homa aktivado.

Finante miajn senpretendajn glumbaĵojn pri la traduka Esperanta literaturo kaj la efiko de Esperanto kiel internacia komunikilo, mi ne povas ne konfesi, ke ĉian provon montri al neesperantistoj la kvalitojn de Esperanto, kompreneble ni devas fari ne en nia linternacilingvo, kiel mi nun faras, sed en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. Pro tio, mi petas ĉiun samideanon, se li volas, traduki mian artikolon kaj aperi ĝin en iu ajn gazeto aŭ revuo nacilingva.

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto Movado

BEL-Estraro

Irani Baggi de Araújo



Irani Baggi de Araújo naskiĝis en Petropolis, Rio de Janeiro, la 5-an de aŭgusto 1891, kaj forpasis en Rio, la 12-an de februaro 1973. Do ŝi vivis preskaŭ 82 jarojn.

Ŝia patro, D-ro Jacome Martins Baggi de Araujo, supera juĝisto, estis la unua brazilano, kiu interesiĝis pri Esperanto. Li fondis la institucion "Petropolis Esperanto-Klubo". Jacome havis tri filinojn: Avani, Irani kaj Araci. Avani ankaŭ estis agema esperantistino.

Kiam estis juna, Irani fariĝis esperantistino kaj frue sin dediĉis al nia movado. Ŝi okupis lokon en la estraro de Virina Klubo, Brazila Klubo de Esperanto kaj Brazila Esperanto-Ligo (BEL). En BEL ŝi okupis la postenon de sekretario kaj, ekde 1947, tiun de kasisto. Profesie ŝi laboris en National City Bank.

Laŭ artikolo aperigita de Brazila Esperantisto, majo-aŭgusto 1973, "ne nur pri mono ŝi spertis. Samrangan kompetentecon ŝi elmontris sur la kampo de sekretariaj helplaboroj. Ŝi maŝinskribis ĉiujn tekstojn; ŝi legis ĉiujn leterojn; ŝi prizorgis pri ĉiuj arkivoj, Biblioteko kaj Libro-Servo."

Irani estis klera virino. Ŝi tradukis verkojn el brazila literaturo, uzante pseŭdonimo. Inter alie, ŝi tradukis esperanten "Passionária", de Coelho Neto; "Os Moinhos", de Luiz Guimarães Filho; kaj "O Mistério", ankaŭ de Luiz Guimarães Filho.

Ŝi scipovis la francan kaj la hispanan lingvon, krom la portugalan kaj Esperanton. Rilate al la lingvo de Zamenhof, ĝin ŝi perfekte posedis.

Irani neniam edziniĝis. Ni povas diri, ke nia movado estis sia unusola filo. "Ŝi estis la plej diligenta estraranino de nia Asocio, ĉiutage, frumatene, posttagmeze aŭ vespere, se necese; dum la tuta semajno, sabate aŭ dimanĉe, se bezonate; ŝi ĉiam estis preta labori, kunlabori, prilabori, porlabori. La movado estis por ŝi ŝia spirado", esprimis la aŭtoro de la menciita artikolo (Brazila Esperantisto, majo-aŭgusto 1973).

Irani Baggi de Araújo ĉeestis la sidejon de BEL dum pli ol kvindek jaroj. Tia mirinda virino estis fakte fervora esperantistino. La progresado de Esperanto en nia lando multon ŝuldas al Irani, kies memoro estas ekzemplo al la nunaj geesperantistoj. Vere ŝi estis modela laboranto por nia idealo.

Sendube Irani Baggi de Araújo estis tre laborema kaj tre kompetenta esperantistino, pro tio ŝi meritas ĉi tiun omaĝon de la revuo Brazila Esperantisto, oficiala organo de BEL.

Ekspozicio pri Esperanto en la Ĉambro de Deputitoj


BEL-Estraro

La Ĉambro de Deputitoj, en la ĉefurbo de Brazilo, okazigis ekspozicion pri Esperanto nomita "Esperanto estas...", inter la 4-a kaj la 15-a de aprilo 2011, celante disvastigi la lingvon. Respondeis pri la okazintaĵo sinjorino Maria das Dores Barcellos, esperantistino kaj funkciulino de la Ĉambro de Deputitoj, kun apogo de la deputitino Andreia Zito.

La 6-an de aprilo, vespere, Paulo Nascentes, Úrsula Grattapaglia kaj la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, Lício de Almeida Castro, prelegis pri Esperanto al pli ol cent gastoj. La solenaĵo finiĝis per koktelo kaj amikaj interparoloj.

Okaze de la evento oni disdonis centojn da informiloj pri nia lingvo kaj la radios-tacio de la Ĉambro de Deputitoj elsendis informojn pri la ekspozicio.

Galerio de Fotoj



Fernando Marinho ne plu inter ni

BEL-Estraro



FERNANDO JOSÉ GALVÃO MARINHO naskiĝis en Rio de Janeiro, la 5-an de aŭgusto 1933, kaj forpasis la 10-an de februaro 2011, en la sama urbo. Li estis 77-jara, emerita kolonelo de Brazila Armeo, bakalaŭro pri pedagogio, konata en la esperantista rondo kiel Marulo. Li mortis pro kormalsano. La entombigo okazis en Tombejo "Caju", kiu troviĝas en Rio de Janeiro. La flago de Esperanto kovris la ĉerkon.

Marinho esperantistiĝis en 1952. Li mem klarigis la aferon en la revuo Rio Esperantista:

"En 1952, kiam mi estis preskaŭ en la fino de la dua-grada kurso de la ĉi tiea Militista Lernejo, la karmemora instruisto de latina lingvo, Carlos Juliano Torres Pastorino, pere de flugfolioj, sciigis nin pri la afero Esperanto. Tuj post li sukcesis aranĝi allogan prelegon kun partopreno de elstaraj esperantistoj kaj okazigi vesperajn kursojn. Ekde tiam la mikrobo 'esperantismo' enloĝiĝis en mia sango kaj mi ne plu resaniĝis."

Marinho estis prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo dum la periodo 1982-1985. Li estis unu el la respondeculoj pri la paciĝo de la brazila Esperanto-movado kaj pri la kunfandiĝo inter Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto. En letero al Nelson Pereira de Souza, la 22-an de marto 1983, li skribis:

"Mia flanke, mi ankaŭ volas aserti al vi, ke mi estas preta daŭre kunlabori kun vi en tiu batalado por la unuiĝo kaj interkompreno en la movado."

Marulo prezidis la Lokan Kogresan Komitaton (LKK) de la 36-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Petrópolis, Rio de Janeiro, en la jaro 2000.

La samideano senlace laboris por la disvastigado de Esperanto. Li emis skribi leterojn por ĉefe defendi nian lingvon. En la 18-a de aprilo 1989, li sendis korespondaĵon al TV Globo kaj proponis raportaĵon pri Esperanto, por aperi dum la programo "Globo Repórter". La televido ne akceptis la sugeston de Marinho, bedaŭrinde.

Pro la artikolo "Língua Legal", de Otto Lara Rezende, aperigita en la ĵurnalo "O Globo", la 2-an de aŭgusto 1981, li sendis leteron al tiu famkonata brazila verkisto, aldonante informojn pri Esperanto.

Fernando Marinho organizis la libron "Não só idealistas, mas realizadores", kiu estas kompilaĵo de atestoj de gravaj brazilaj esperantistoj pri ilia esperantistiĝo.

Nia eminenta samideano estis ankaŭ preleganto. La 4-an de marto 1989, en la sidejo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro (AERJ), li prelegis pri "Frenet-Pedagogio". Dudeko da samideanoj ĉeestis la eventon: elstaraj veteranoj kaj scivolemaj novuloj.

Marulo estis bonkora homo. Pri tio oni legis opinion de Pedro Cavaleiro, eksprezidanto de BEL, en interreto:

"Marinho estis unu el tiuj silentaj laborantoj kiuj multe pli faris ol anoncis. Marinho estis bonega animo kaj bonega amiko. Kiam mi prezidis la Ligon kaj travivis kelkajn pezajn tempojn, ĝuste dum la plej malfacilaj horoj, mesaĝoj de Marinho simple ekaperis en mia mesaĝilo por komforti kaj apogi min. Li estis kiel la feoj de infanaj rakontoj, kiuj ekaperas en la plej krizaj momentoj por lumigi la vivon. Li neniam, neniel, ion ajn petis de mi, sed ĉiam sentenis donaceme kaj diskrete."

Nome de la brazila esperantistaro, D-ro Lício de Almeida Castro, nuna prezidanto de BEL, esprimis sinceran kondolencon al familianoj de Marinho.

36-a *Brazila Kongreso de Esperanto*



14/16 Julio 2000 - Petrópolis



20
unidades

Temo: Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia

Organizado:
Esperanto-Klubo de Petrópolis

Aŭspicio:
Liga Brasileira de Esperanto

Brazila Kroniko

BEL-Estraro

Kio okazas en via Regiono?



En la urbo Sankta Maria – Federala Distrikto – oni havas bazan esperantan kurson ekde 2008, kiam estis fondita Nukleo Ismael Gomes Braga de Esperanto en Spiritisma Centro Guillon Ribeiro. NIGBE celas disvastigi Esperanton ne nur en spiritismajn grupojn de la urbo, sed ankaŭ en najbarajn urbojn. La gelernantoj de NIGBE estas supre surfotitaj. Sendu viajn mesaĝojn al NIGBE: nigbe@hotmail.com.

Maja kulturkunveno duoble ĝuinda

Okazas ĉiumonate, la maja kulturkunveno de EASP speciale regala la vizitantojn per du prelegoj.

La unua preleganto, la juna advokato Rodrigo de Méo, parolos pri "Teorioj de



Konspirado", kaj li mem pravigas la elekton de sia temo:

"Kiam mi estis infano, kuzo mia – al kiu tre plaĉis Elvis Presley – kutimis diri, ke lia preferata kantisto ne mortis. Mi ĉiam pensis, ke tiaj kuzaj ideoj estas absurdaj, tamen pro tio ke oni ankoraŭ ne elmontris bildon de Bin Laden, forpasinta post la atako de Usono, mi ree pripensis la sintenon de mia parenco. Nu, kiu efektive povas garantii, ke Elvis kaj Bin Laden estas ja mortintaj? Kaj kio pri la ideo, ke Paul McCartney - kredis ja - estus mortinta, eĉ se li mem anonas spektaklojn en Brazilo en baldaŭaj tempoj? Estas ankaŭ onidiroj, koncerne al tio, ke la homo ne atingis la lunon, ke Titanic neniam dronis kaj ke

sondiskoj, kiam ludataj laŭ kontraŭa direkto, elmontras kaŝitajn mesaĝojn - nur por citi kelkajn tiel nomatajn "Teorioj de Konspirado". Cetere, samideano diras, ke li rekontis Zamenhof-on persone, en panvendejo, antaŭ nemultaj tagoj..."



La temo de la dua prelego estos "La mondo en transformiĝo: la bezono de individua kaj entreprena Etiko" kaj ĝin prezentos la juna bakalaŭro pri psikologio, Ísis Climany Okabe Piton, ankaŭ studento pri personarmas-trumado, eksprezidanto de BEJO - Brazila Esperantista Junulara Organizo, ano de Kulturo Esperantista & Ekologiludilejo, en Campinas, kaj Delegito de UEA por la urbo Paulínia-SP.

Kiel kutime, la kulturkunveno okazos en la lasta sa-

bato de la monato (la 28-an de majo) ekde la 4-a posttagmeze. La sidejo de Asocio situas ĉe strato Faustolo 124, en kvartalo Lapa.

Sukcesinta Esperanto-renkonto en Niterojo, Brazilo



Okazis la 14-an kaj la 15-an de majo en la urbo Niterói la 22-a E-Renkonto de Ŝtato Rio-de-Ĵaneiro. Ĉirkaŭ 100 personoj partoprenis la eventon, kiu estis interesa kaj varia. Kunorganizis ĝin Niterói E-Klubo kaj Asocio Esperantista el Rio-de-Ĵaneiro. Partoprenis geesperantistoj ne nur el la urbo Niterói, sed ankaŭ de aliaj pluraj urboj de la ŝtato (Rio de Ĵaneiro, Petrópolis, Teresópolis, Campos, Paraíba do Sul) kaj eĉ oni havis la partoprenon de kelkaj aliŝtataj samideanoj (Amarílio Carvalho, el Barra do Garças, Nazaré Laroocca, el Juiz de Fora, Tulio Flores, el Belo Horizonte, kaj Roberto Resende, el Brasília).

La evento okazis en la taŭgaj salono kaj lernoĉambroj de Fakultato Maria Thereza, proksime al la urbocentro de Niterói. La programo estis riĉa kaj varia. Okazis simpozio pri la temo de la Renkonto "Disvastigado - Kiel trafi?", pluraj kunvenoj pri aparta E-temoj (Delegiteco, Instruado, Disvastigo ktp), diversaj prelegoj (Tulio Flores pri "Ideoj por la E-Movado"; Paulo Carvalho pri "Vivo de Ismael Gomes Braga"; Aloísio Sartorato pri "KKE sesdekjara: Elstaraj Agadoj"; Márcio Santos pri "Pripensoj por Disvastigo"; Dirce Sales pri "Kromoterapio").

Okazis ankaŭ varia kaj bunta arta programo, muzikprezentadoj (Fabiano Henrique, Neide Barros Rêgo, Nilde Barros Diuana, Koruso de la Triângula Universitato, Dirce Salles) kaj deklamado (Maria Otília, Nilde Barros Diuana, Walter Fontes, Véra de Beaurepaire-Rohan, Graça Eliana Thuler, Sebastião Campelo, Walmir Ventura Rego, Grupo de Teatro L.L.Zamenhof kaj Amarílio Carvalho).

Gratulon al la organizinto de la evento (NITEK) kaj al la aŭspiciinto (AERJ)!!

Laŭ Aloísio Sartorato

Individuaj Poŝtmarkoj en Brazilo

Jam de pli-mapli tri jaroj en Brazilo oni povas plani, desegni poŝtmarkojn kaj ilin publikigi pere de la oficiala, landa Poŝto. Tiuj poŝtmarkoj apartenas al la mendintoj kaj povas esti uzataj samkiel la ordinarnaj poŝtmarkoj: por afranki leteron ĉu al Brazilo, ĉu al iu ajn fremda lando.

Mi jam lanĉis kelkajn priesperantajn poŝtmarkojn kaj intencas daŭrigi tiun ideon, kiu iomete kontribuas por la diskonigado de la Internacia Lingvo, ĉar ili funkcias kiel malgrandaj reklamoj pri ĝi. La bildojn kaj tekstojn kiuj formas la poŝtmarkojn mi prilaboras en la softvaro "CorelDraw" kaj ilin sendas al la Poŝto en la formato *.png.

Koncerne la prezon, ĝi estas kode skribita sur la akompana parto de la poŝtmarko: "Carta Comercial Primeiro Porte"; nuntempe tio egalas al R\$1,10 (Noto: letero, pezanta inter 0 kaj 20g, de Brazilo al Eŭropo kostas, nuntempe, R\$2,55). Tiu poŝtmarko, principe, ne perdus sian validecon (ĝi povas esti utiligata por pagi la sendkoston de letero kiam ajn oni volas).

Laŭ Pequim Tenório Vaz



Lia Ekscelenco

Lima Barreto

Tradukis: Francisco Stefano Wechsler

Notoj de la tradukinto: Afonso Henriques de Lima Barreto (1881–1922) estis brazila ĵurnalisto kaj verkisto. Liaj verkoj estas sarkasmaj kaj per ili li akre kritikis la senagemon de la brazila popolo kaj ĝian klasdividon. Li ankaŭ ridindigis tiamajn aŭtoritatulojn kaj ilian malsimplan verkstilon.

La Ministro forlasis la ambasadejan balon kaj tuj eniris la veturilon. Dum du horoj li revadis pri tiu momento. Li sopiris resti sola, sola kun sia penso, zorge pripensante la vortojn de li diritajn, rememorante la sintenojn kaj miregajn rigardojn de la ĉeestantoj. Tial li eniris la kupeon rapide, senpacience, eĉ ne rimarkinte, ĉu efektive ĝi estas la lia. Li venis blinde, pelite de kompleksaj sentoj: fiero, forto, kuraĝo, vanto.

Li tuta estis ujo de certeco. Li estis certa pri sia propra valoro; certa pri siaj eksterordinaraj kaj ekstremaj kvalitoj. La respektemo de ĉiuj kaj la universala cedemo ĉirkaŭanta lin estis sendube signo pri la ĝenerala kredo, ke li estas la sintezo de sia lando, la enkarneigo de ĝiaj sopiroj. En li vivis la doloraj plendoj de malriĉuloj kaj la grandiozaj deziroj de riĉuloj. Malklaraj kaŭzoj de aferoj prave lin levis tien kaj pli alten portos, ĉar li, sole nur li, kapablos gvidi la landon al la destino neprigata de ties antecedentoj...

Kaj li ridetis, kiam tiu ĉi frazo preterpasis liajn okulojn, plene skribita per presliteroj, en iu libro aŭ ĵurnalo. Li rememoris sian ĵusan paroladon.

“En la vivo de socioj, same kiel en la vivo de individuoj...”

Kia mirindaĵo! Ĝi enhavis ion filozofian, transcendan. Kaj kion diri pri la sukceso de tiu parto? Li rememoris ĝin tuta:

“Aristotelo, Bakono¹, Kartezio, Spinozo kaj Spencero², same kiel Solono, Justiniano, Portaliso³ e Iheringo⁴, ĉiuj filozofiistoj, ĉiuj juristoj asertas, ke leĝoj devas baziĝi sur moroj...”

La tre brila, admirplena rigardo — la rigardo de la opoziciestro — estis la plej fidinda pruvo de la frazefiko...

Kaj kiam li finis! Ho!

“Sinjoro, nia tempo postulas ampleksajn reformojn; ni agordiĝu al ĝi: ni reformu!”

La formaleco apenaŭ bridis, en la ĉeestantoj, la entuziasmon, per kiu tiu fino estis ricevita.

La spektantaro ekstazis. Tondris aplaŭdoj; kaj, en la salonego iluminata,

ŝajnis al li, ke la tuta Tero lin aplaŭdas.

La veturilo plu rapidegis. La lumoj de la longa strato aspektis kiel unu sola fajrostreko; poste ili malaperis.

La veturilo kapturte kuradis en fosforeska nebulo. Vane liaj majestaj okuloj ege malfermiĝis; ne ekzistis konturoj, formoj, kien ili povus direktiĝi.

Li konsultis sian horloĝon. Ĉu ĝi haltis? Ne; sed ĝi indikis la saman horon kaj la saman minuton, kiam li eliris el la festo.

— Koĉero, kien ni iras?

Li provis mallevi la vitrojn. Li ne sukcesis; ili brulvundis.

Li klopodis pli intense kaj sukcesis mallevi la antaŭajn. Li kriis al la koĉero:

— Kien ni iras? Fripono, kien vi portas min?

Kvankam la veturilo havis kelkajn mallevitajn vitrojn, ene regis forĝeja varmego. Kiam venis al li en la menson tiu ĉi figuro, li zorge palpis, surbruste, la belegajn kruĉmedalojn. Danke al Dio, ili ankoraŭ ne fandiĝis. La birma leono, la ĉina drako, la hinda lingamo tie staris, inter ĉiuj aliaj sendifektaj.

— Koĉero, kien vi portas min?

Li ne estis la sama koĉero, ne estis la lia. Tiu viro kun hoknazo, longa mentono kun barbetto, ne estis lia fidela Emanuelo.

— Kanajlo, haltu, haltu, male vi estos severe punata!

La veturilo flugadis kaj la ministro daŭre koleregis:

— Fripono! Perfidulo! Haltu! Haltu!

Je unu el tiaj elkrioj sin turnis la koĉero; sed la mallumo, kiu grade fariĝis preskaŭ kompleta, lasis lin vidi nur la okulojn de la kaleŝa kondukisto, kiuj brilas moke, metale kaj tranĉe. Ŝajnis, ke li ridas.

La varmo pliintensigis. La anguloj de la veturilo eligis fajrerojn. Ne povante elteni la varmon, li malvestis sin. Li deprenis la galonfrakon, poste la glaveton, la veŝton, la pantalonon.

Li sentis sufokiĝon, kapturton kaj la impreson, ke li plu vivas, sed liaj gamboj kaj brakoj, liaj trunko kaj kapo dise dancadas.

Li svenis; kaj, rekonsciiĝinte, li vidis sin vestita per ordinara livreo kaj groteska cilindra ĉapelo, dormetanta ĉe la pordo de la palaco, en kiu li estis antaŭ nelonge kaj el kiu li triumfe foriris, antaŭ kelkaj minutoj.

Proksime kupeo haltis.

Li intencis zorge ekzameni la ĉirkaŭaĵojn; sed ne estis tempo.

Sur la marmoraj ŝtuparoj, gravmiene, solene, viro (tiel ŝajnis al li) malsupreniradis la ŝtupojn, ĉirkaŭvolvite per la galonfrako, kiun li demetis, portante surbruste la samajn belegajn kruĉmedalojn.

Tuj kiam tiu persono atingis la sojlon, li impete alproksimiĝis kaj, servute, kvazaŭ li ĝis tiam nur tion faradis, demandis:

— Ĉu Via Ekscelenco deziras la veturilon?

1 - Francisko Bakono (1561–1626), angla sciencisto, filozofiisto kaj juristo.

2 - Herberto Spencero (1820–1903), angla filozofiisto kaj biologiisto.

3 - Johano Portaliso (1746–1807), franca juristo kaj politikisto.

4 - Rudolfo Iheringo (1818–1892), germana juristo.

Kongresoj de Esperanto : gravegaj por nia kulturo

Paulo Sergio Viana



Lingvoj havas sencon nur se ili ligiĝas al kulturo. Ĉu oni povas pensi pri la portugala lingvo sen penso pri Camões aŭ Machado de Assis? Ĉu oni povas pensi pri la itala lingvo sen Dante aŭ pri la angla sen Ŝekspiro?

Kio pri Esperanto? Kia estas ĝia kulturo? Ne temas nur pri literaturo, sed pri apartaj moroj, nia historio, niaj specialaj intereso-
soj, niaj komunaj deziroj, celoj kaj valoroj. Oni povas aserti, ke la kulturo de Esperanto ligiĝas al ia idealo pri frateco, egaleco kaj demokratia respektemo al ĉiuj homoj. Esperanto superis ĉiujn projektojn de internacia lingvo kaj fariĝis vera lingvo danke al samtempa kreado de kulturo de hejmo. Se ĝi iam forperdis tian

traĵton, tiam ĝi mem forvelkus kiel lingvo.

Sekve, plej forta intereso por la Esperantista popolo estas konservi kaj ampleksigi sian kulturon. Kiel? Unuavice, per flegado de la lingvo mem. Ju pli da homoj bonnivele kapablas uzi Esperanton, des pli forta ĝi aperas antaŭ la mondo. Se ĝia originala kaj tradukita literaturo prosperas, se denaskaj Esperantoparolantoj plimultiĝas, se turismo disvastiĝas per ĝi, se scienco kaj teknologio uzas ĝin, se artistoj kantas en Esperanto, se aktoroj ludas, se prelegantoj esprimas siajn ideojn en Esperanto – tiam ni efektive rajtas fieri, ke nia lingvo estas vivanta kaj utila.

Tamen, kulturon konstruas popoloj, kaj nia popolo estas diaspora. Kiel plenumi tian bezonon, se la homoj estas disaj? Unu bela, efika rimedo estas niaj kongresoj, festivaloj, renkontoj kaj klubkunvenoj. De la komenco de nia historio la kongresoj plenumis gravan rolon, tiel ke oni apenaŭ povus imagi la Esperanto-movadon sen ili. Tra la tuta mondo oni ilin okazigas, nuntempe je centoj, ĉiujare, en ĉiuj kontinentoj. La eventoj Esperantistaj estas mirinde multaj kaj variaj. Konsultu nur la paĝaron de la informilo "Eventoj" en interreto.

Precize nun, Brazilia Esperanto-Ligo proponas al ni specialan okazon ke ni, kiel komunumo, celebru unu plian komunuman manifestiĝon de nia tutlanda asocio. De la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011, en San-Paŭlo, ni havos la okazon saluti gesamideanojn, riĉigi nian scion per aŭskultado de prelegoj, amuziĝi koridore, bale kaj ekskurse, viziti (kaj aĉeti!) la libroservon, ĉeesti kursojn, aŭskulti muzikon. Ĉio en nia kara lingvo. Ĉu ni rajtas maltrafi? Ĉi-jare, la brazila Esperantistaro havos la okazon kunsperti kun eksterlandaj samideanoj la verdan

mondon, ĉar samtempe okazos la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto. Krome, ankaŭ gejunuloj kongresos ene de Brazila Junulara Esperantista Organizo (BEJO). Do triobla festo!

En tempo de interreto, kiam ĉiu moderna homo emas izole alfronti nur la ekranon de sia komputilo, ni memoru: nia kulturo de Esperanto ne formiĝis kaj ne firmiĝos nur virtuale: ĝi bezonas personajn kontaktojn, manpremojn, kisojn kaj ĉirkaŭbrakojn. Ni devas aŭskulti kaj aŭskultigi niajn voĉojn, rigardi en la okulojn, starigi vizaĝon kontraŭ vizaĝo, amike kaj varmkore diskuti niajn problemojn. Per tio Esperanto gajnos, kaj ankaŭ ni mem.

Al San-Paŭlo, en julio, amase, do! Ĉu vi jam enskribiĝis?





MANOEL MOACIR SISCCATI (1944-1910) mortis la 17-an de aŭgusto 2010, en Ribeirão Preto, São Paulo. Li naskiĝis la 5-an de januaro 1944, en Ribeirão Preto, estis emerita instruisto pri lingvoj kaj delegito ekde 1991 de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Neusa Priscotin, en interreto, skribis:

“Li estas parto de la historio de Esperanto en la urbo kaj regiono, estinte unu el la kunfondintoj kaj instruistoj de iama Ribeirão Preto Esperanto-Klubo. Lastatempe, pro diabeto, sen povi translokiĝi facile, li instruis Esperanton en sia propradomo...Dum la tempo de atendo al la enterigo en la tombejo Saúdado, laŭ lia deziro firme esprimita dumvive, lia ĉerko estis kovrita per du flagoj: pli elstare la es-

peranta flago kaj duarange la flago de ALARP- Academia de Letras e Artes de Ribeirão Preto”. Li estis honora membro de APERP – Asocio por Esperanto de Ribeirão Preto kaj ĉiam partoprenis kulturajn kunsidojn de tiu organizaĵo, nomataj “verda vendredo”.

Esperantistoj ĉeestis la funebran ceremonion kaj entombigon, ofertante florojn kun omaĝa teksto en Esperanto nome de APERP.

RONILSON MENEZES MOTA mortis en la 27-a de januaro 2011, kiam li estis 53-jara. Li naskiĝis la 1-an de junio 1951, en Salvador, Bahia, kaj diplomiĝis pri Beletro ĉe Federacia Universitato de Bahio.

Li instruis la anglan kaj Esperanton. Komence de la 80-aj jaroj, li kunfondis Esperantistan Societon de Salvador, kiun li prezidis. Ronilson tradukis al portugala la lernolibron “Lernu Esperanton” (metodo de Zagreb). Lastatempe li laboris kiel entreprenisto.

Ronilson prezidis la Lokan Kongresan Komitanton de la 26-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Salvador, en 1990. Sendube li estis unu el la plej laboremaj esperantistoj en la ŝtato Bahia.

JUDITH MARIA FERREIRA BARATA forpasis en la 10-a de oktobro 2010, en Braziljo. Ŝi naskiĝis en Rio de Janeiro, la 27-an de novembro 1924, kaj translokiĝis al Braziljo en 1976, kiam eklaboris por nia lingvo en la sidejo de Brazilja Esperanto-Asocio. Dommastrino, Judith rezervis sian liberan tempon al Esperanto, partoprenis la Universalan Kongreson de Valencio, Hispanio, en 1993, kaj en kelkaj naciaj kongresoj. Ŝi ĉeestis plurajn E-eventojn en la ĉefurbo de Brazilo.

Judith estis ankaŭ membro de UEA kaj BEL.

Ŝi tre ŝatis babili esperante kaj plurfoje telefonis al Carlos Maria por simple interparoli uzante la lingvon!...



47-a Brazila Kongreso de **Esperanto**

47° Congresso Brasileiro de Esperanto

Dato: de la 15-a ĝis 19-a de Januaro 2012
Taguatinga (Brasília/DF)

Temo: Renoviĝo de Esperanto-Movado:
Komunikado, Diskonigado kaj Edukado

Tema: Renovação do Movimento Esperantista:
Comunicação, Divulgação e Educação



www.taguatek.org.br



Taguatinga Esperanto-Klubo




Esperanto-Asocio de Brasília



Brazila Esperanto-Ligo

Libroservo de Brazilia Esperanto-Ligo



Esperanto por lernejaj klasoj 1.
Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2008. 164 pg. 28cm. Paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo A1-A2-B1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.



Esperanto Baza Kurso.
M.A.F.Teixeira. Florianópolis: UFSC. 2005. 390 pg. 23 cm. 7 lecionoj kun la 16 fundamentaj reguloj, gramatiko, kaj diversaj kaj gravaj tekstoj por praktiki la legadon. R\$45,00 + sendokosto.


Esperanto por lernejaj klasoj 2.
Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2010. 178 pg. 28cm. La dua volumo de la paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo B1-B2 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.



Vojaĝo en Esperanto-lando.
B.Kolker. Rotterdam: UEA. 2005. 280 pg. 24 cm. Perfektiĝa kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanto kulturo. R\$59,00 + sendokosto



Ilustrita Metodo de Esperanto.
Y.L.Seguin. Belo Horizonte: EEE. 1977. 123 pg. 28 cm. Tute ilustrita, ĉi tiu kurso estas bazita sur la laboro de Dr. William S. Benson kaj inkludas Ekzercaro de Zamenhof. R\$30,00 + sendokosto.



Esperanto para principiantes. A.Sartorato. Brasília: BEL. 2008. 130 pg. 22 cm. 16 lecionoj kun propra vortaro. Nur la libro R\$25,00 + sendokosto. KD-Sono kun lecionoj kaj dialogoj vendata malkune. R\$10,00.

Esperanto em método ilustrado.
S.Marcek. Slovakia: autor. 2007. 114 pg. 25 cm. Kurso kun 22 lecionoj, ilustrita, kun vortaro kaj gramatiko en portugala lingvo. R\$30,00 + sendokosto.



Esperanto de nivelo al nivelo.
Korody Z., Kovacs M., Salomonne C.P., Dr. Szabo L. Budapest: ELTE-ITK. 2008. 136 pg. 24 cm. Lingva ekzmeno origo. Tiu ĉi libro celas helpi la prepariĝon je la ekzameno en niveloj B1, B2 kaj C1. R\$42,00 + sendokosto.

